

RESUME PRI LA ESPERANTO - MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO  
( 1918 - 1976 )  
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1978

EKDE LA FONDO DE EA ĈSR ĜIS TIES LIKVIDIĜO (1918 - 1952)

I. ENKONDUKO

La internacia lingvo Esperanto tre baldaŭ penetris sur la teritorion de la nuna Ĉeĥoslovakio. Jam en jaroj 1889 - 90 okazis en Praha la unua kurso fare de Frant. Vlad. Lorenc, la aŭtoro de la unua lernolibro por ĉeĥoj (1890). En Praha, Esperanto jam de 1889 surpronis karakteron socirevolucian kun klara celado internacia kaj alpaca. Ne mirige, ke sekvis persekuto de la tiana aŭstria polico kontraŭ Lorenc, kiu devis fuĝi por poste, fariĝi la unua esperantisto en Brazilo (sub la nomo Franc. Vald. Lorenz). -- En Brno fondiĝis en 1901 la unua klubo (la unua en Mez-Eŭropo), 1902 en Praha. En 1908 fondiĝis du asocioj: Bohema Unio Esperantista (de grupoj) kaj Bohema Asocio Esperantista (konsistanta el individuoj), kun du gazetoj.

Post la unua mondmilito, kiu disfalis la malamatan imperion aŭstra-hungaran kaj liberigis la regatajn naciojn, la E.-movado en Ĉeĥoslovakio eniris novan evolu-etapon. La du konkurencaj asocioj kunfandiĝis en Ĉeĥoslovakian Asocion Esperantistan (1-an de febr. 1922).

II. HISTORIO ĜENERALA (PRIORGANIZA) 1918 - 1952

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista (ĈAE) reprezentis la esperantistojn ĉeĥajn kaj slovakajn kaj tiujn de etnaj grupoj en la lando. Kiel prezidanto funkciis Josef Eiselt, poste d-ro Stan. Kamarýt. La germanaj esperantistoj en ĈSR tamen kreis apartan ligan: Germana Esperanto-Ligo en Ĉeĥoslovakio (GEL) kun la centro en Liberec (prezidanto Inĝ. G. Scholze). Tiu atingis en 1932 395 membrojn. Ambaŭ asocioj, dividintaj, en la IIIa landa kongreso en Bratislava 1926, siajn agadsferojn, laboris paralele, kun reciproke amikaj rilatoj. En UEA ili estis reprezentitaj aparte, sed la enlandaj kongresoj estis aranĝataj kune.

En 1930, ĈAE havis membrojn kaj klubojn en 144 lokoj. En 1932, zorge de la ĉefdelegito O. Sklenčka, ĈSR atingis la unuan lokon en la mondo per sia nombro de UEA membroj (1194; en 1928: 1361, dua loko).

Sekvante ripetatajn dezirojn pri unuecigo de la movado, ĈAE kaj GEL kreis komunan komisionon, kiu ellaboris statuton de unueca enlanda organizaĵo ESPERANTO - ASOCIO EN ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO (EAĈSR) - Svaz esperantistů Československé republiky. Tiu ekfunkciis la 1-an de jan. 1935 kaj daŭris, laŭjure, ĝis la 6-a de sept. 1952. Ĝi donis al la nacioj de la respubliko plenan laŭstatutan aŭtonomion en laŭlingva sekcioj.

Sed pro la tiam furiozanta naziisma propagando nur parto de la germanoj eniĝis en EAĈSR kaj GEL formortis en 1938 per propravola likvidiĝo. En tiu jaro, EAĈSR havis 39 lokajn grupojn. Ĝiaj prezidantoj estis d-ro Stan. Kamarýt, Jos. Friedrich dum la "Protektorato" kaj poste Adolf Malík, kiu plenumis la likvidon de la asocio.

Dum la okupacio de la ĉeĥaj regionoj fare de la nazia Germanio (1939 - 45), EA adaptis sian nomon al tiu "en Bohemio kaj Moravio" kaj daŭrigis sian agadon ĝis marto 1940, kiam Gestapo fermis ĝian kvarĉambran oficejon en Praha II kaj "permesis" libervolan likvidon, kiu okazis formale la 3an de nov. 1940. Tamen la fakta likvido restis nefinita kaj restis iom da mono por la postmilita asocia vivo. La asocio povis disvendi, kun grava prezoredukto - en 1940 - grandan stokon de sia librovendejo (libroj en kaj pri Esperanto). - Dum tiu malfacila tempo, dekoj da ĉeĥaj esperantistoj oferis sian vivon en batalo kontraŭ la malamiko aŭ trovis la morton en koncentrejoj.

## LA PERIODO 1945 - 1952

Tuj post la forpelo de la malamiko, fare de la Soveta armeo (majon 1945), vigla organiza vivo rekomenciĝis. EA ĈSR atingis oficialan rekonon pri jura kontinueco de sia ekzisto kaj ricevis la koncesion por eldonado kaj vendado de libroj pri IL (tamen, en 1948, reduktitan al sola vendado). EAĈSR kondukis la postmilitan movadon sur la plej altan stupon de la ĝistiam evoluo, al la plej vasta grado de praktika aplikado de IL en diversaj fakoj de la publika vivo, en servoj al la socialisma ŝtato. -

Fine de 1945, EA havis 766 membrojn, dum en 1949 3955; SES tiam havis 750 membrojn, do sume estis en 1949 4705 organizitaj membroj en la ŝtato. EAĈSR havis en la UEA-Komitato kvar komitatanojn (A), plej multa el landaj asocioj. La slovakoj fondis en 1945 propran organizaĵon SLOVAKA ESPERANTO-SOCIETO (SES) en Bratislava, kun propraj kongresoj. Prezidanto: P. Rosa. Okazis traktado de EAĈSR kaj SES rezervi al EAĈSR la tutŝtatan karakteron kaj fondi novan Ĉeĥan E.-Asocion, sed pro formala malhelpo kaj politikaj eventoj la plano ne realiĝis. Male, la novaj cirkonstancoj igis SES fariĝi en 1950 aŭtonoma laŭlingva sekcio de EAĈSR. (Antaŭ 1945, oni apenaŭ povas paroli pri movado en Slovakio. Ekzistis tie kelkaj kluboj).

Post la jaro 1949 mirinde aktiviĝis la esperantista junularo, instigita de siaj jarkonferencoj en R. ožnov p. R., kaj ĝi plurloke transprenis la gvidadon de la lokaj grupoj aŭ faris novajn rondojn. Junularaj jarkunvenoj aŭ konferencoj okazis ĉiujare de 1950 dum pluraj jaroj. Bone laboris sistemo de "regionaj delegitoj" junularaj. En apr. 1952, la Junularo havis 26 aktive laborantajn grupojn kun 541 membroj; tiu de EK Praha havis propran meblitan klubejon. Pluraj junularaj cirkuleroj (bultenoj multobligitaj) vigle redaktataj aperadis. La gejunuloj post 1952 transprenis de la nejunuloj, iom ŝokitaj de la likvido de la landa asocio, la iniciatemon.

EAĈSR akiris sen iu ajn subvencio bonan ekonomian bazon, kun (de 1948) oficejo kaj oficistoj. Ĝia kongreso en Liberec, 1949, patronita de ministro, kaj tiu en Brno, 1950, estis imponaj manifestacioj pri interpopola kompreniĝo kaj pri porpaca laboro. La mil kongresanoj en Brno, 7 mil afiŝoj pri tiu kongreso, 440 kursanoj nur en someraj kursaroj, kelkcent partoprenantoj en 13 regionaj kunvenoj, vojaĝoj de pli ol du mil esperantistoj por eksterklubaj entreprenoj, 98 lokoj kun organizita esp. aktiveco (58 filioj kaj memstaraj kluboj, 30 rondetoj kaj E.-fakoj ĉe sindikataj kulturkluboj /ZK/ plus 10 interes-rondetoj en lernejoj) en la ĉeĥa landparto kaj 12 lokaj grupoj en Slovakio kun 2 gimnaziaj studrondoj – sume 112 lokaj unuoj - ĉio ĉi en unu jaro, tiu 1950, estis elokventa fakto pruvanta vivantecon de la movado en nia lando. "Ĉeĥoslovakio estis la plej forta bazo de E. en la tuta mondo" - opiniis la hungara historiisto L. Kókény en "Hungara vivo" (1/1969).

Post la jaro 1950 tiu situacio poŝtupe ŝanĝiĝis kaj kondukis al disfaligo de la centraj institucioj de la movado kaj en 1952 al dolora disreviĝo de la aktivistoj de la movado. Fine de 1950, laŭ konsiloj de la ministerio por eksteraj aferoj, EAĈSR eksigis en UEA kaj la prez. Malík iniciatis internacian kampanjon por fonda de Internacia Ligo de Progresema Esperantistoj (ILPE), sed ne atingis oficialan aprobon.

En 1951 – 52, surbaze de nova situacio sur la kampo de organizaĵoj en la lando, la grupoj transiris de EAĈSR (kelkaj formortis) en la unuecan sindikat-organizaĵon ROH kun la statuto de "interes-rondetoj" de sindikataj kulturkluboj /ZK/ aŭ fariĝis rondetoj de la tiamaj Klerigaj Societoj (OB). Pluraj el ili tiel plibonigis sian situacion, aliaj havis nebonajn spertojn.

De 1952 nuliĝis la elonpermeso por la asocia organo "Esperantista", la ĉiutagaj radio-elsendoj, kune kun pluraj alilingvaj, ĉesis jam en sept. 1950. Fine estis eldonita nova leĝo pri organizaĵoj (n-ro 68), laŭ kiu ekzistu plu sole kelkaj amasaj organizaĵoj kaj la ceteraj, "kies plua ekzisto ne helpas la konstruadon de socialismo aŭ ĝin bremsas", likvidu sin (CNK Praha 26.3.52). Asocia komisiono intertraktis dum longa tempo kun la sindikata centro pri eniĝo kaj poste kun la ministerio de internaj aferoj pri konservo de almenaŭ ia centro por la esperantista movado.

Starigita en senelirejan situacion kaj volante eviti eventualajn malfavorajn postsekvojn de disirigo de de la Asocio por la lokaj E.-rondetoj, la asocia Centra Komitato post longa kunveno, la 6a-n de sept. 1952, akceptis likvidon de la Asocio. La movado perdis de tiu tempo sian organizan centron.

### III. PARTO SPECIALA

ESPERANTISTAJ GAZETOJ DE 1918: La Progreso (1918 – 34) en Plzeň kaj Praha, de 1923 ofic. organo de ĈAE, red. Hromada). La Kulturo (laborista, 1912-14, post la 1-a milito en Plzeň), Ligilo (1933 – 39, de 1938 organo de EA), Bulteno de ĈAE (1933-39), Esperantista (organo de EA, 1946 - 51, red-, d-ro Kamarýt), Esperantisto Slovaka, fondita de A. Váňa (1946 – 51), de 1948 eldonata de Slovaka E.-Instituto en Martin, red. de E. Tvarožek kaj d-ro L. Izák, Esperantský zpravodaj (eld. 1920 - 23 de J. Šupichová), Esperanto-Servo (vidu ĉe Instituto de E.-Servo), multobligata Gazetara servo de EAĈSR (Kořínek kaj Pytloun), blindula brajle presita Aŭroro kaj kelkaj aliaj kun nelonga aperdaŭro. GEL havis bultenojn Marto (1920-23) kaj Informilo de GEL (1934-38). - Eldonkvanto de "Esperantista" estis 4000 en 1949, "Esperantisto Slovaka" 2000. "Esperantista" estis bonege redaktata (metita de "Svisa espero", 1950, sur la unuan lokon inter la interesaj gazetoj). Post ĝia ĉesigo aperadis diversaj "cirkuleroj" (multobligitaj bultenoj), en 1952: 10, precipe junularaj kaj krome "La Pacdefendanto" (Burda).

LABORISTA MOVADO. En 1911 estis fondita de F. J. Chaloupecký Laborista Unuiĝo Esperantista kiel fako de la socialdemokrata kleriga asocio Laborista Akademio. Eldonis la cititan "La Kulturo", 1912-14. Ĝi turnis sin senkaŝe al laboristoj konsciantaj pri sia aparteno al la batalanta klaso kaj ĝi trovis rimarkindan resonon. 1918-32 ekzistis en Praha Asocio de laboristaj esperantistoj. En 1920 estis fondita Laborista Ligo Esperantista en Ĉeĥoslovakio, sidejo en Plzeň, gvidata de Pech, kun ciklostilita bulteno de 1928. En 1932 fondiĝis plua, konkurenca "Ĉeĥoslovaka Laborista Asocio Esperantista, en Ústí n. L., membro de ISE. En 1946 reaktiviĝis en Plzeň la antaŭmilita Laborista esperantista societo "Kulturo" kun samnoma bulteno. La LAE en Ĉeĥ. memvole disiĝis en 1947 por plifortigi la unuecan organizaĵon esperantistan. Okazis ankaŭ laŭtemaj ekspozicioj, ekz. pri laborista klasbatalo, Plzeň 1949.

ESPERANTO INTER VIRINOJ. Dum la unua milito kunvenadis ĉe J. Šupichová en Praha Virina rondeto, post la milito ŝi fondis (1919) kaj gvidis Rondeton de esperantistinoj, kiu estis la 1-a esp.societo en ĈSR, laŭtempe.

KATOLIKOJ havis, ĝis 1945, propran Ligon de katolikaj esperantistoj. Ĝia prezidanto episkopo A. Eltschner estis honorita per alta ŝtata ordeno.

ESPERANTO ĈE BLINDULOJ. La blindula instituto Klár en Praha gvidis de 1904 kursojn de E. por blinduloj. De 1922 ili organizis sin en Societo de ĉeĥoslovakaj nevidantaj esperantistoj (SOĈNE). De j. 1920 aperas - ĝis nun! - gazeto en E. kun plej daŭra vivodaŭro en ĈSSR (zorge de Ĉeĥa Blindula Preso), la brajle presita Aŭroro, senpage distribuata ankaŭ eksterlanden. Pro 50-jara laboro inter blinduloj, ĝia redaktoro Vuk Echtner ricevis la plej altan medalon de la blindula asocio.

LITERATURO: ĝis 1952 aperis sume 30 libroj tradukitaj el la ĉeĥa beletristika literaturo, inter ili la plej reprezenta Ĉeĥoslovaka antologio, redaktita de Ginz kaj Kamarýt. El tio la societo Moraviaj E.-pioniroj eldonis 12 verkojn, i.a. romanojn de Čapek. En la Esperanta literaturo akiris famon poetoj kaj tradukantoj St. Schulhof, M. Lukáš, R. Hromada, T. Pumpr, K. Píč, en posta periodo E. Urbanová.

NACIAJ KONGRESOJ (ne kalkulante la "jarkurvenojn"): 1-a en Brno 1922, 300 partopren., 2-a Liberec 1924, 3-a Bratislava 1926, 4-a Teplice 1928, 5-a Olomouc 1932, 6-a Brno 1935, 7-a Liberec 1949, 8-a Brno 1950 (kun 988 partopren.). Tiu en Brno akceptis porpacan rezolucion. Krom la kongresoj okazis ĉiujare jarkunvenoj kaj eĉ kelkaj regionaj konferencoj.

INTERNACIAJ RENKOTIĜOJ EN ĈEĤOSLOVAKIO: 1) XIIIa Univ. Kongreso de E., Praha 1921 (2500 part. el 35 landoj), 2) Faka konferenco Paco per lernejo, Praha 1927, 3) IKUE-

kongreso, Praha 1929, 4) Tutmonda tendaro de Skolta E.-Ligo, B. Bystrica 1934, 5) 18-a IKUE-kongreso en Brno 1936, kun ampleksa ekspozicio, 6) Antaŭkongreso de la 29-a UK, Praha 1937.

REPREZENTIĜO EN INTERTIACIAJ INSTITUCIOJ: krom en la Komitato de UEA, ĈSR (ĈSSR) estis reprezentita en la ses-membra Internacia Centra Komitato de la E.movado (ICK) kaj en la Akademio de E. (per 1 - 3 membroj; nun: Karel Píř). - La ĉs. registaro reprezentis sin en pluraj UK, antaŭ la dua mondmilito.

INSTITUTO DE ESPERANTO-SERVO estis, de 1948, fako de EAĈSR kun aprobo kaj subvencio de la ministerio por informado kaj klerigo por peresperanta informado de la eksterlando. Ĝi eldonadis presitan ĵurnalforman organon pri politiko, ekonomio kaj kulturo "Esperanto-Servo" (po 5 mil ekz., ĝis la komenco de 1951 140 mil ekzempleroj senpage distribuitaj). En serio de broŝuroj estis eldonitaj la ĉeĥoslovaka konstitucio el la j. 1948, 15 mil ekz., kaj Lerneja reformo en ĈSR, la lasta en du eldonoj. La konstitucio retradukita el E. aperis ĉinlingve 1951, la dua vekis sensacion ĉe instruistoj dum la UK en Bournemouth.

INSTRUADO DE ESPERANTO. Ĝis 1918 aperis 18 lernolibroj, ĝis 50aj jaroj 25, kun la ŝlosiloj en nombro 140 mil ekz., ellasante la multobligitajn lernolibrojn. De tiu tempo aperis kelkaj pluaj. De 1945 ĝis 1.6.1951 estis venditaj 29200 lernolibroj de E. Vortaroj estis eldonitaj pluraj, ekz. la grandaj de Filip. - Dekreto de la lerneja ministerio, 1921, permesis nedevigan instruadon de E. en lernejoj (uzis ĝin 2 - 15 lernejoj, en 1948 27 lernejoj kun 865 partoprenantoj). - LEKTORATOJ DE E.: Ĉeĥa teknika altlernejo (1922-51, d-ro A. Pitlík), Germana tekn. altlernejo Praha 1925-33, Alta lernejo minista Příbram, 1925-30. Alta komerca lernejo Bratislava, 1946-51 (P. Rosa), - RADIOKURSOJ DE E.: Brno 2foje, Praha, Bratislava inter j. 1927-32, Ostrava en 1947 kun 1000 lernantoj, - SOMERAJ KURSOJ DE E.: 1946-56 Somera kolegio en Doksy, kursoj Rožnov, Karlovy Vary, Příbor, Svit, Popad. De 1952 la Klubo en Trebíč aranĝas ĉiujare popularan bone ekipitan studtendaron en Lančnov (SET). Similaj okazis de 1952 plurfoje en Žimrovice (klubo Opava) kaj aliloke. - Ŝatata estis Internacia somerrestadejo esperantista en la banloko Lázně Bělohrad, 1932-38. - Ĉs. E.-INSTITUTO, fond. 1923, kun oficiala aprobata privata E.-lernejo (Eiselt kaj d-ro Pitlík), - Centra Estraro de Sindikatoj enmetis, en 1946-47, Esperanton en siajn "LABOR-LERNEJOJN". Edikto de la informministerio, 1949, taskis al la Klerigaj Konsilantaroj kunlabori kun esperantistoj por vekii intereson de laboristoj pri E.

ESPERANTO EN RADIO apartenas al gloraj ĉapitroj de la ĉs. movado, signitaj de unuaeco en monda kadro (nuntempe transprenita de Varsovio). Unua elsendo en E.: 1923 (d-ro Pitlík), 1933 kolektivo e profesiaj aktoroj en Brno komencis la tradicion de la fama "Verda stacio" ( teatraĵoj, operoj), en 1948 translokita al Praha. De sept. 1945 ĝis sept. 1950 Praha elsendis ĉiutage novaĵojn en E., komence unufoje, poste dufoje, lunde kaj ĵaŭde eĉ trifoje. Elsendis ankaŭ Ostrava, Hradec Králové, Ústí nad Labem. Sume: iom pli ol 4000 elsendoj en 1945-50 pli multe ol en la franca lingvo. Aŭskultraportoj el 32 landoj. (Enurbaj disaŭdigoj ne kalkulitaj). La Esperanto-elsendoj, laŭ atestoj el eksterlando, helpis ankaŭ la ellernon de ĝusta prononcado de Esperanto.

PRELEGVOJAĜOJ DE FREMDULOJ okazis pluraj, ekz. Scherer, K. Ajayi, EN EKSTERLANDO prelegvojaĝis niaj membroj (Vítek kaj aliaj).

En la kolektado de subskriboj por la petskribo de UEA al UNO Ĉeĥoslovakio atingis la 2-an lokon per 1 201 154 subskriboj kolektivaj kaj individuaj, inter la lastaj de sindikatestro kaj ĉefministro A. Zápotocký, de ministroj, 47 parlamentanoj, ĉefepiskopo.

Jaroslav Mařík

## RESTARIGO DE LA MOVADO (1952-1968)

La aktivado de Esperanto-Asocio en ĈSR finiĝis la 6-an de septembro 1952 per memvola likvido de la Asocio. Ĝi tamen ne signifis likvidon de la esperantista movado en ĈSR; la esperantistaj kluboj kaj rondetoj fariĝis membroj de klerigaj kaj kulturaj tutŝtataj organizaĵoj, de sindikataj kulturkluboj, de la sindikata movado ktp.

La likvido ne estis direktita kontraŭ esperantistoj aŭ kontraŭ la esperantista movado. Tion pruvis daŭrigo de la esperantistaj kluboj kaj de la esperantista aktiveco post la likvido de la Asocio. Cetere ne estis likvidita nur Esperanto-Asocio en ĈSR, sed ĉiuj similaj asocioj kaj organizaĵoj, ekz. tiuj de filatelistoj, diversaj kolektantoj, teatro-amatoroj ks.

Tiun ĉi likvidon kaŭzis la restrukturigo de la societa vivo en Ĉeĥoslovakio, kiu koncentriĝis en tutŝtataj klerigaj kaj kulturaj organizaĵoj, posedantaj potencajn ekonomiajn kaj materiajn rimedojn. Tial paradokse - post la likvido de la Asocio - la plimulto de la esperantistaj kluboj kaj rondetoj povis nun vivi en pli bonaj ekonomiaj kondiĉoj ol en la malnova Asocio. Same estis reorganizita ankaŭ ekz. sporta movado, amatora movado ktp.

Kvankam bone intencita, likvido de la Asocio kaŭzis multajn komplikaĵojn. Oni forgesis, ke la esperantista movado ne estas nur homoj parolantaj Esperanton (al organizita movado apartenas nur malgranda parto de tiaj homoj), sed ankaŭ internacie organizita movado, kiu akceptigas certajn intencojn kaj ideojn. La internacia organizo de la esperantista movado estas nepre necesa, ĉar ĝi kreas kondiĉojn por internacia komunikado, por esperantista komunumo, en kiu oni povas Esperante interkompreniĝi. La ĉesigo de la laboro de la Asocio malpliigis la kontaktojn kun la tutmonda esperantistaro, malfermis influon la laboron de internaciaj Esperanto-organizaĵoj, kie ĉeĥoslovakaj esperantistoj - kune kun tiuj el la socialismaj landoj - ludis sufiĉe gravan rolon; tiamaniere ankaŭ finiĝis sukcesa popularigo de Ĉeĥoslovakio pere de Esperanto.

Tial komenciĝis strebado por starigo de centra gvida organo de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado. Necesas mencii la laboron de Rudolf Burda, kunfondinto de Mondpaca Esperantista Movado, kiu reprezentas ĝis hodiaŭ unu el la plej progresemaj partoj de la internacia Esperanto-movado. Burda provis arigi ĉirkaŭ sia revuo "La Pacdefendanto" kernon de esperantistoj, kiuj poste akceptigis restarigon de la gvida centro en la esperantista movado en Ĉeĥoslovakio. Burda, sindona komunisto kaj esperantisto, kiu por ambaŭ idealoj perdis sian sanon en naziaj koncentrejoj, mortis en la tempo, kiam liaj ideoj kaj idealoj komencis realiĝi.

Post nelonga tempo ankaŭ politikaj kaj ŝtataj organoj komprenis, ke la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio ne povas ekzisti sen kunordiga kaj idea gvidado. Tial en la jaro 1955 konstituiĝis Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista (TKKE), gvidata de Josef Vitek. Ĝia funkcio estis ĉefe kunordiga kaj metodika. Tiu ĉi organo ne havis ankoraŭ oficialan statuton, sed ĝi jam kunlaboris kun ŝtataj instancoj. Leĝigo de tiu ĉi organo okazis en 1958 pere de la decido de Ministerio de lernejoj kaj kulturo, kiu la Tutŝtatan Komitaton transformis en Ĉeĥoslovakian Esperanto-komitaton (ĈSEK), kies unua prezidanto, d-ro Jaromír Jermář, estis nomita rekte de la ministro. (La sekvanta prezidanto estis ing. František Svíták). Membro de la Komitato estis ankaŭ la prezidanto de la iama Esperanto-Asocio en ĈSR, Adolf Malík. La tasko de la Komitato estis reprezenti la ĉeĥoslovakian esperantistaron eksterlande, helpi metodike kaj ideologie al esperantistaj kluboj kaj rondetoj kaj pere de Esperanto popularigi Ĉeĥoslovakion.

Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato faris dum sia dekjara ekzistado, en modestaj kondiĉoj, multe da sukcesa laboro. Ĝi renovigis la informan centron pere de "Informoj de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato", kiuj fariĝis ligilo inter la izolitaj Esperanto-kluboj en la tuta respubliko. Funkciuloj de la Komitato vizitadis la klubojn kaj influis la laboron de ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Renovigitaj estis ankaŭ kontaktoj kun la socialismaj landoj kaj kun la internacia Esperanto-movado. En tiuj jaroj estis por la unua fojo la Universalaj Kongresoj de Esperanto organizitaj en la socialismaj landoj (1959 en Varsovio, 1963 en Sofio, 1966 en Budapeŝto), kiujn partoprenis ankaŭ multaj ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Estis publikigitaj pluraj broŝuroj kaj libroj pri Ĉeĥoslovakio, gvidlibroj, kulturaj eldonaĵoj kaj aliaj publikaĵoj en Esperanto. Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato transprenis ankaŭ la funkcion de ĉeĥoslovaka sekcio de MEM kaj eldonadis ĉeĥoslovakajn

numerojn de la revuo "Paco". La ĉeĥoslovaka sekcio intime kunlaboris kun Ĉeĥoslovaka Komitato de Pacdefendantoj kaj la gvidanto de la sekcio, Tomáš B al d a, estis honorigita per alta rekono – la Ĉeĥoslovaka Pacpremio. Sed malgraŭ tiuj ĉi relativaj sukcesoj evidentiĝis ankaŭ malavantaĝoj de tia aranĝo, kian prezentis ĈSEK. Izolitaj esperantistoj, kiuj ne estis aroj de kluboj kaj rondetoj, havis nenian kontakton kun la aliaj esperantistoj kaj ofte estis perdantaj intereson pri Esperanto. La Komitato ne povis oficiale reprezenti la ĉeĥoslovakajn esperantistojn en internaciaj Esperanto-organizaĵoj, ĉar ĝi estis organo de la Ministerio de lernejoj kaj kulturo. Ĝi ankaŭ ne povis administre gvidi la klubojn kaj rondetojn, ĉar tiuj estis membroj de diversaj kulturaj kaj klerigaj organizaĵoj.

Tial SEK ellaboris en la jaro 1966 ampleksan raporton, kiun ĝi prezentis al la Ministerio de lernejoj kaj kulturo kaj al la Ministerio de internaj aferoj; ĝia gvida ideo estis reorganizi la Esperanto-movadon en Ĉeĥoslovakio laŭ societa formo, sed samtempe ne rompi komplete la ĝisnunan formon de ligiteco al kulturaj kaj klerigaj organizoj. La esperantistaj kluboj kaj rondetoj povus (sed ne estus nepre devigitaj) labori en la kadro de klerigaj kaj kulturaj organizaĵoj kaj povus tiamaniere profiti ilian materian kaj financan helpon; sed la membroj estus anoj de la centra esperantista organizo, al kiu ili pagus kotizojn kaj kiu - pere de siaj elektitaj organoj - gvidus la Esperanto-movadon en la lando. Ambaŭ ministerioj konsentis kun la propono: tial en marto 1969 en sia konstitua kongreso en Brno fondiĝis Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj paralele en Slovakio Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko.

PhDr. Jaromír Jermář, CSc

## **INTER LA UNUA KAJ DUA KONGRESOJ DE ĈEA (1969 - 1976)**

Kiel jam menciite en la antaŭa ĉapitro, la monato marto 1969 signifas gravan mejloŝtonon en nia movado, ĉar komencis sian ekziston Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA).

Estas ja tutklare, ke la unuaj monatoj eĉ jaroj estis materie malfacilaj, kvankam oni uzis por la sekretario de ĈEA parton de la ĉambro de la Kleriga Instituto, kiu ĝis la fondo de la Asocio administris ĝenerale la movadon. Estu menciite ankaŭ, ke la kritika situacio estis por pluraj gesamideanoj signalo por regule finance helpadi la asocion.

La gvidantoj de ambaŭ naciaj asocioj en ĈSSR intencis dekomence fondi federacion, sed ĝis hodiaŭ laŭleĝe ĝi ne efektiviĝis, kvankam konsultaj kunvenoj okazas ĉiujare.

Kompreneble en ĉiujaraj laborplanoj oni dedikis grandan atenton al moralpolitika eduko de la asociaj membroj, agorde kun la marksismaj-leninismaj principoj de la proleta internaciismo kaj paca kunvivado. Jam en la laborplano por 1970 estas enprogramita vasta kunlaboro kun esperantistaj organizaĵoj de la socialismaj landoj kaj kun la ceteraj organizaĵoj en ĉiuj sferoj de porpaca kaj kultura karaktero.

Surbaze de aprobo de la kulturministerio la 27-an de majo 1970 ĈEA aliĝis al UEA kun 1100 asociaj membroj kaj provizore kun 20 membroj-abonantoj ekde 1970. En pluraj lokoj montriĝis kapablaj organizantoj kaj lokaj grupoj kiel Jablonec, Mělník, Tábor kc. aranĝis renkontiĝojn, kiuj plurloke estiĝis jam tradiciaj. La renkontiĝo en la banloko Poděbrady kun internacia partopreno estis ligita al ŝakfestivalo.

Jam en la konstitua jaro de nia Asocio efektiviĝis pluraj signifaj entreprenoj kiel Somera Esperanto-tendaro en Lančov, Somera restadejo en Herbortice, Skisemajno en Malá Fatra kaj ceteraj. En la jaro 1970 la plej grava estis la II-a Kulturfestivalo en Opava.

Por starti pli grandskalan propagandon la Asocio presigis 20 000 propagand-foliojn (komence nur 5 000 ekz., tre rapide elĉerpiĝis). Ŝtata pedagogia eldonejo provizis la merkaton per 15 000 ekzempleroj de lernolibro por komencantoj de Teodor Kilian kaj poŝvortaro de Rudolf Hromada (20 000 ekz.). Surprizon kaŭzis la eldono de Poŝatlaso de la mondo, unikaĵo, kiun eldonis Kartografie, nacia entrepreno en Prago (1971) en 13 000 ekzempleroj. Kunlabore kun Heroldo de Esperanto aperis (fine de 1970) la lernolibro de W. Auld "Paŝoj al plena posedo", post kelkaj jaroj reeldonita. Dum la UK en Vieno ĈEA kiel membro de UEA ekhavis du komitatanojn en la kategorio A: la prezidanton Josef Vitek kaj la vicprezidanton de la Asocio D. Kočvara.

Dum jaroj tre populariĝis (unue en aŭtuno 1971) la kampanjo de libro-lotoj, kiuj ĉiujare efike helpas finance la Asocion. Samjare efektiviĝis ankaŭ la longe atendita apero de la "Libro de Apokrifoj" de Karel Čapek en la traduko de Josef Vondroušek.

En la jaro 1971 oni realigis en Vsetín manifestan renkontiĝon de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj, kiu impone impresis ĉiujn ĉeestantojn.

La Asocio estis preparita strukturan ŝanĝon de kluboj kaj grupoj je lokaj grupoj de ĈEA kaj inter la unuaj estas tiu de Prago (marto 1971). En junio 1971 festis la plej malnova ĉeĥa klubo en la moravia metropolo Brno sian sepdekjariĝon. La jaro 1972 estiĝis jubilea por la sepdekjara Esperantista klubo en Prago. Por regule informadi lokajn grupojn la sekretario komencas eldoni nacilingve stencilatajn "Informojn".

Tuj komence de la 1972-a jaro, laŭ la iniciato de la MEM-sekcio startis grandskala kampanjo "Helpe al la batalanta Vjetnamio", plurfoje alte aprezata de pluraj urboj samkiel de la vjetnamiuj aŭtoritatoj.

Medicina sekcio de ĈEA aperigis popularajn Medicinistajn Informojn, bonvene akceptitajn en pluraj landoj. En decembro 1972 la Asocio aranĝis plurtagan politikan klerigan seminarion de siaj funkciuloj en Měříň apud la valdigo Slapy.

Junulara sekcio serĉis novajn agadformojn en kunlaboro kun lokaj junularaj organizaĵoj, Interkluboj, kaj organizis tutŝtatajn seminariojn.

La nova sekretario de ĈEA Zdenko Křimský signifas en la asocia agado kaj ties struktura koncepto grandan ŝanĝon. Ĉeĥa Esperanto-Asocio transprenas distribuadon de ĉiuj importataj Esperanto-gazetoj, zorgas pri grandkvanta importo de libroj kaj aliaj materialoj surbaze de interŝanĝo. Komence de 1974 ĈEA akiras sian propran sekretariojn en strato Jilská n-ro 10.

Okaze de la 20-jariĝo de MEM, la Sekcio distingis per honorinsignoj de MEM meritplenajn kaj longjarajn funkciulojn de la movado kaj de la Ĉeĥoslovaka Packomitato. La funkcion de la ĝenerala sekretario de MEM post la forpaso de T. Balda transprenis D. Kočvara.

Du libroeldonaĵoj estas menciindaj el tiu tempo: la unua, kun teknika enhavo, de Inĝ. JUDr. M. Tůma, CSc, "Pri la varmo", kaj la alia el sfero de la scienc-fikcia literaturo "La perdita vizaĝo" de J. Nesvadba. Nacia entrepreno Orbis eldonas fotoprese poŝtkartojn "Saluton el Ĉeĥoslovakio". Ŝtata Pedagogia Eldonejo eldonas en 10000 ekzempleroj lernolibron por progresintoj de J. Cink, kiu preligis ankaŭ skriban kurson.

La jaro 1975 havas kelkajn karakterizajn trajtojn: strebadon por plikvaltigo de la laboro de iuj sekcioj kaj komisionoj kaj lokaj grupoj, ke ili aktive kunlaboru kun lokaj, distriktaj kaj ceteraj aŭtoritatoj. Manifesta estis la dua renkontiĝo de ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj en Vsetín.

Pluraj lokaj grupoj (Ostrava, Příbram k.a.) okaze de la 30-jara jubileo de la liberigo de Ĉeĥoslovakio organizas la ekspoziciojn "Esperanto en la servo de paco" kaj "Esperanto kaj laborista movado" kaj kolektis valorajn materialojn pri esperantistoj de nia lando, kiuj laboris en la rezista movado. Konstituiĝis Sekcio de nevidantoj de ĈEA.

Kiel aparta aldono de "Paco" aperis samjare broŝuro de Oldřich Kníchal, "Komenio kaj la internacia lingvo". Simile bonvene akceptis nia membraro la eldonon de literatura almanako "Panoramo" kaj la asocia presorgano "Starto" aperis en nova aranĝo. Oni ne forgesu la jaron 1975 kiel la "Internacian jaron de virino". Per detala studo de Jaroslav Mařík "Virinoj en ĉeĥoslovaka E-movado", aperinta en "Starto", sed ankaŭ pere de ĉi-temaj programoj en diversaj lokaj grupoj, ĈEA partoprenis kaj substrekis ties signifon.

Karakterizante la lastatempan periodon de la ekzisto de ĈEA, speciale post la laborkonferenco en Ostrava en 1973, oni devas substreki la gravecon de esenca kunlaboro kun la ŝtataj organoj, paralele kun gravaj eventoj en la mondo, speciale kun la konferenco en Helsinko.

Kaj se la lastaj jaroj ekonomie firmigis la Asocion, tio ne signifas stagnon, sed daŭran serĉadon de novaj laborformoj.

Tute laŭnature estas praktikata pli kaj pli profunda kunlaboro kun la slovakaj esperantistoj, kiuj per sia vigleco povas servi multokaze kiel ekzemplo (televida kaj radiaj kursoj, diversaj renkontiĝoj, tendaroj en Dudince, Opátka k.a.).

En februaro 1976 naŭdek delegitoj de lokaj grupoj kaj multaj gastoj (entute pli ol 300)

enlandaj kaj eksterlandaj, oficialaj senditoj el socialismaj landoj, partoprenis la duan kongreson de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, dum kiu estis elektitaj la novaj gvidorganoj de ĈEA. La kongresanaro havis la okazon konatiĝi kun la efektiva antaŭeniro de la enlanda movado, kies ĉefaj labortrajtoj estas ne nur la disvastigo de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ plenumado de sociaj taskoj en la socialisma ŝtato, plimultigo de ĝiaj kulturaj, ekonomiaj kaj politikaj atingoj, akirado de novaj amikoj por ĝi en eksterlando kaj ne lastvice sekurigo de la mondpaco.

Josef Víték

## LA MEM-AGADO (1953-1976)

La agado por kaj per Esperanto en Ĉeĥoslovakio ne ĉesis post likvidigo de EA ĈSR en 1952, precipe dank' al la intensa agado de la esperantistoj en Plzeň, kie ekaperis stencilita gazeto "La Pacdefendanto" (1952), redaktata de Rudolf Burda. Ĝi alvokis jam fine de la jaro 1952 ĉiujn anojn de la Internacia lingvo en ĈSR aliĝi al uzinaj kluboj kaj daŭrigi la interrompitan agadon.

Burda iniciatis migrantan ekspozicion pri la tutmondaj klasbataloj kaj pacmovado, kiun spektis la publiko en pluraj lokoj. Li sendigis i.a. salutleteron kun Esperanta traduko, subskribita de diversaj organizaĵoj kaj institucioj en Plzeň al la konferenco de pacdefendantoj de aziaj kaj pacifikaj landoj en Pekino (septembron 1952) kaj alvokis ĉiujn Esperanto-rondetojn sekvi tiun ĉi ekzemplon.

La esperantistoj-pacbatalantoj el ĈSR kontribuis en la sama jaro al la sukceso de la printempa foiro de Brita Packomitato en Londono.

Burda prave atentigas en "La Pacdefendanto" (marton 1953), ke "la Esperanta kaj pacdefenda movadoj devas sin reciproke kompletigi" ĉar ili ambaŭ luktas kun la samaj malhelpaĵoj kaj por la sama celo...

La regiona konferenco en Přerov, majon 1953, kun 200 partoprenantoj, mencias la preparatan renkontiĝon de la esp. pacbatalantoj en St. Pölten kaj rekomendas elsendi delegitojn. Kvar monatojn pli poste estas elektita en St. Pölten kiel prezidanto de la ĵus fondita MEM neĉeestanta Rudolf Burda.

En 1954 aperas la unua ĉeĥoslovaka numero de "PACO".

La estiĝo de MEM sekvigis pozitivan eĥon en la esperantista movado enlanda. En Opava oni lanĉis kunlaboron kun la loka packomitato. Regiona Packomitato en Plzeň invitis la reprezentantojn de EK al siaj aranĝoj okaze de la vizito de aŭstralia pacdefendanto d-ro B. Cass. Ankaŭ en Ostrava kaj Olomouc oni sukcesis kontakti la lokajn packomitatojn kaj eklabori kun ili. La Somera Esperanto-Kolegio en Doksy (aŭguston 1954) ĝuis la patronecon de la tiea Distrikta Packomitato. Helpe de la ER en Jablonec kontaktiĝis la urba packomitato kun tiu en Stokholmo kaj okaze de la Internacia tago de virinoj interŝanĝis vicon da leteroj. Dank' al la MEM-aktivuloj en Děčín kelkdekoj da enurbaj mezlernejoj kontribuis per siaj verkoj al la volumaro "Infanoj de la mondo", aperonta ĉe la japana eldonejo Heibonsya.

Inter la ĉefaj programeroj de la tutŝtata konferenco de la Esperanto-rondetoj en Přerov, majon 1954, kiun partoprenis 187 delegitoj el 51 lokoj, estis la porpaca laboro per Esperanto.

Fine de 1954 "La Pacdefendanto" havas jam pli ol mil kaj "PACO" ĉ. 300 regulajn legantojn.

Mejloŝtono de la MEM-aktivecoj en Ĉeĥoslovakio estis la tutŝtata konferenco en Otrokovice, julion 1955, sub la devizo "Per Esperanto por la mondpaco", kiu kunvenigis 300 partoprenantojn. Ĉeestis ankaŭ la reprezentantoj de KPĈ, sindikatoj, urbaj aŭtoritatoj kaj ĵurnalistoj. La internacian aspekton de la aranĝo substrekis la ĉeesto de delegitoj el Francio, Aŭstrio, Danlando, Svedio kaj Usono.

La aktiveco de la ĉeĥoslovakaj MEM-anoj en tiuj jaroj pioniris ne nur la renaskiĝon de la enlanda movado, sed fariĝis ankaŭ avangardo de la esperantista movado en la socialismaj landoj.

Post la konstituiĝo de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato en 1958 la landa MEM-sekcio daŭrigis sian laboron en la nova organiza kadro. ĈSEK kaj ties Porpaca sekcio prizorgis ekde 1960 la eldonadon de la ĉeĥoslovakaj numeroj de "PACO" (ekde 1957 presita), laŭ kies kvanto kaj kvalito Ĉeĥoslovakio baldaŭ okupis la unuan lokon en la internacia skalo.



La sekcio iniciatis subskriban kampanjon por la peticio de la Komitato Albert Schweitzer kontraŭ nukleaj eksperimentoj. Sur la peticio-listoj kolektiĝis pere de MEM ĉirkaŭ cent mil subskriboj el 12 landoj, el ili duono el Ĉeĥoslovakio.

La sekcio realigis vicon da agadoj, inter la esperantistoj kaj ankaŭ inter la civitanaro, kontraŭ la milita agreso de Usono en Vjetnamio, instigante sendadon de solidarecaj mesaĝoj pere de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio. En la sesdekaj jaroj ĝi alvokis 63 landajn, internaciajn neŭtralajn, fakajn, junularajn, virinajn kaj aliajn Esperanto-organizaĵojn, ke ili agu similmaniere. La MEM-sekcio krome organizis protest-kampanjon - kontraŭ preskriptiĝo de militkrimoj en Federacia Respubliko Germanio.

La ĉeĥoslovakaj numeroj de "PACO" estis daŭre dissendataj al la perantoj proksimume en 40 landoj. Ili populariĝis ne nur la pripacan temaron, sed ankaŭ ĉiutagan labor-aktivecon de la popolo en Ĉeĥoslovakio. La ekstraj aldonoj de "PACO" konatigis al la legantoj la enlandan kulturon. Tiel aperis sinsekve la verkoj de K. Havlíček Borovský, Petr Bezruč, Karel Čapek, Josef Nesvadba, J. A. Komenio kaj la informlibreto "Kio estas MEM". La konstantan atenton pri "PACO" kaj ties eldonado motivigis ankaŭ la klopodo pri plifortigo de la organiza bazo de MEM.

Laŭ la komisio de la MEM-estraro en Sofio estis okazonta en Ĉeĥoslovakio (1968) la unua Semajno de la internacia amikeco, kies iniciatinto MEM estis. La okazigon malhelpis la eventoj en la jaro 1968.

Konsiderinde helpis la ĉeĥoslovakajn MEM-aktivulojn la tiama Ĉs. Komitato de Pacdefendantoj, kiu rekomendis la Internacian Lingvon al regionaj kaj distriktaj packonsilioj. Distrikta Packonsilio Prago-okcidento adoptis en la jaro 1966 Esperanton kiel oficialan lingvon kaj aplikis ĝin en siaj kontaktoj kun alilandaj organizaĵoj. Por la publikaĵoj pri Lidice k.a. eldonitaj de la Komitato, estis presitaj Esperantaj tekstoj. Kunlabore kun Mezbohemia Packonsilio okazis dissendado de salutleteroj al 30 landoj okaze de la Internacia tago de infanoj.

Post la konstituiĝo de la memstaraj landaj asocioj, ĉeĥa kaj slovaka (1969), apartigis ankaŭ la porpacaj MEM-sekcioj. Nur en 1973 oni kreis la Ĉeĥoslovakajn MEM-sekcion kiel kunordigan organon por vastigi la komunan adkampon, ekzemple ĉe eldonado de "PACO". En Slovaka Socialisma Respubliko oni starigis komisionon de AE SSR ĉe Slovaka Packonsilio, en ĈSR la MEM-sekcio reprezentigis en la Ĉeĥa Packonsilio kaj en la fakaj komisionoj de Ĉeĥa Packonsilio kaj de Ĉeĥoslovaka Packomitato.

Pluraj aktivuloj de MEM laboras kiel membroj de distriktaj aŭ urbaj packonsilioj. La MEM-rubriko estas enkondukita en la organo de Ĉs. Packomitato "Mír" kaj la gazetaro ĝenerale tre ofte mencias la porpacan laboron de la ĉeĥoslovakaj esperantistoj.

En tiu ĉi periodo la sekcio kulminigas sian solidarecan agadon per la plej grava kampanjo iam entreprenita en postmilitaj jaroj inter la ĉs. esperantistoj ("Helpe al la batalanta Vjetnamio" 1971-1972). Oni aranĝis entute 237 diversajn agadojn, parte en la kadro de rondetoj, parte publikajn - ĉefe prelegojn, filmprezentadojn, ekspoziciojn. Pri Vjetnamo prelegis aktivuloj de kulturaj kaj politikaj instiucioj, de **N a c i a F r o n t o**, packonsilioj kaj reprezentantoj de la vjetnamaj ambasadorejo kaj kultur-Centro en Prago.

La partoprenintoj de tiuj ĉi aktivecoj kolektis kaj donacis al VPEA entute 1350 kg da papero por skriba uzo, al la vjetnamaj infanoj ludilojn por 2625 Kĉs kaj 7050 lernejo-kajerojn. Krome oni kolektis 30 960 Kĉs kaj aparte 4 330 Kĉs por kovri la elspezojn de la delegitoj de VPEA al la 58-a UK.

Multaj sociaj organizaĵoj instigitaj de la sekcio sendadis salutleterojn al Hanojo kune kun siaj donacoj por VPEA. Du esperantistajn grupojn Bor kaj Mělník la distriktaj packonsilioj honorigis per la titolo "Esperantista rondeto de pacdefendantoj" por la bonaj rezultoj atingitaj. En la jubilea jaro de MEM (1973) la sekcio okazigis serion da prelegoj antaŭ la Packongreso en Moskvo.

En la lastaj jaroj la esperantistaj pacamikoj en Ĉeĥoslovakio per diversaj agadoj aktive subtenis la ideon de la eŭropa sekureco kaj kunlaboro, ĉefe per eldono de la Fina Akto en Esperanto, multfoje publike esprimis sian solidarecon kun la ĉiliaj patriotoj - konekse kun diversaj renkontoj, kunvenoj, ekspozicioj. Per prelegoj oni popularigis la aktualajn pripacajn temojn kaj

MEM. Menciindaj estas tiurilate la renkontiĝoj en Vsetín, kie okazis en 1975 la konferenco MEM, Mělník, Opava, Poděbrady kaj Jablonec, la loko de la tradicia pacmarŝo. Pacemaj ekspozicioj estis en Ostrava, Brno, Příbram, Pardubice, Plzeň kaj Prago. Sian porpacan starpunkton esprimis la MEM-adeptoj en ĈSR per multnombra konsento kun la Nova Stokholma Alvoko de Monda Packonsilio - por la senarmigo kaj paco.

prom. hist. Oldřich Kníchal

## **R A P O R T O de la prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio pri la funkcia laboro de la Centra komitato dum la periodo inter la II-a kaj III-a asociaj kongresoj en la jaroj 1976 ĝis 1979.**

Estimataj delegitoj de nia kongreso, ŝatataj gastoj kaj geamikoj, karaj gekamaradoj,

hodiaŭa tago, kiu estiĝas plua mejloŝtono en la evoluo de nia Asocio kaj kiu sendiskute estas tago, dum kiu ni enpeniĝos super la atingitaj rezultoj de nia agado kaj laboro, estas ankaŭ tago kiu devintus malfermi kaj montri novajn eblecojn en enhavo kaj la gvidlaboro de nia organizo.

Antaŭ mia pli detala analizo de pasintaj tri jaroj, permesu al mi vin ĉiujn vere plenkore bonvenigi kaj eldiri mian konvinkon, ke niaj komunaj traktadoj havos konstruan kaj respondecan karakteron substrekitan de respeguligo de graveco kaj signifo, kiujn ni aljuĝas al tiu ĉi nia kongreso.

En la tempo de jaro 1976-a, kiam ni samloke travivadis la atmosferon de nia II-a kongreso ĝis hodiaŭ forpasis pluraj niaj signifaj kunlaborantoj, kiuj per sia tutviva agado en la movado same kiel en tutsocia laboro kiel modelaj civitanoj de nia patrujo enskribiĝis neforgeseble en niaj koroj kaj ni ja ĉiuj sentas tre peze ilian malĉeeston. Bonvolu permesi al mi mencii nur kelkajn el ili:

Tomáš BALDA  
Ing.Frant. SVITÁK

- nelacigebla kunlaboranto kaj idea gvidanto en niaj porpacaj laboroj,  
- longjara meritplena laboranto de nia movado speciale en la periodo antaŭ la oficialigo de nia Asocio kaj poste ĝia prezidantaro,

František PYTLOUN  
Theodor KILIAN

- nestoro de nia movado, aŭtoro de skribaj kursoj,  
- profesia pedagogo, kunfondinto de Somera Esperanto-tendaro en Lančcov, aŭtoro de nia plej disvastigita lernolibro de Esperanto, kies manuskripton de lasta eldono li finis kaj enpoŝtigis persone en la tago de sia forpaso,

Božena MEZNEROVÁ  
Anna HEJNOVÁ  
prof. Emil ŠMÍD kaj  
Bohumil KRÁL  
prof. Miloš LUKÁŠ

- ĝis sia alta vivaĝo daŭre agema,  
- ĝisviva kunvivintino de neforgesebla Julie Šupichová,  
- agantaj en nia plej malnova asocia sekcio - fervojista,  
- en Esperantujo mondscale konata poeto, verkisto kaj tradukisto.

Super ĉiuj nomitaj, sed ankaŭ super tiuj, kiuj forlasis niajn vicojn senbrue kiel ili vivis kaj tamen postlasis siajn neforviŝeblajn spurojn en la movado, mi klinas mian kapon en dankemo kaj petas vin per ekstara dediĉi al ili kelkmomentan merititan rememoron!

Sinceran dankon!

**II. La raporton** pri la agado de la centra komitato de nia Asocio mi dividas en tri bazajn partojn: - plenumado de la programo kaj de la rezolucio de II-a kongreso de nia Asocio,  
- agado de la Centra komitato kaj de la asocia prezidantaro en la pasinta tempoperiodo,  
- organiza konstruo de la Asocio.

Per tiu ĉi raporto mi ne celas detale skizi unuopajn punktojn kaj ilian plenumadon, sed konatigi vin kun entutaj kondiĉoj, en kiuj la Asocio troviĝis, kun motivoj kaj kaŭzoj, kiuj nin gvidis al diversaj disponoj kaj agadmanieroj por plenumado de akceptitaj asociaj taskoj. Tial bonvolu senkulpigi min, se iuj malpli gravaj punktoj estos pli koncizaj kaj kontraŭe pli komplikaj iom pli

larĝe klarigitaj.

**III. Unu el bazaj taskoj** de la II-a kongreso estis firmigo de nia Asocio, plifortigo de demokratia centralisma gvidado, de sinsekva ekonomia sekurigo de la Asocio, de disvastigo de niaj celoj en neesperantista publiko, de demandoj interlingvistikaj kaj problemoj de komunikado inter homoj diverslingvaj, de informa kompletigo pri nia lando, ĝia sociala, kultura kaj societa vivo kaj ŝtata sistemo entute, de kunlabora plialtigo kun ceteraj esperantistaj organizaĵoj, nome en socialismaj landoj kaj de plifortigo de kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio.

Ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la problemoj kaj kondiĉoj, dum kiuj estis organizita nia II-a kongreso aprobos mian aserton, ke ni ja enpaŝis en novan funkciajn periodon kun decido superregi ĉiujn samtempajn malfacilaĵojn, sed ke liaj eblecoj vere ĉiuflanke estis sufiĉe malriĉaj kaj ranzonitaj. Per tio mi ne pensas sole pri ekonomia flanko de nia Asocio.

Ni dediĉu nun nian pormomentan atenton al la asociaj funkcioj. Jes, ni kunlaboris kun homoj, kiuj emis akcepti siajn funkciojn kaj dedici sian tempon al taskoj, kiujn ni havis antaŭ niaj okuloj sed pluraj el ili ankoraŭ ne bone superregis la agadmanieron por atingi bezonan nivelon de la asocia vivo. Kelkiuj eĉ pensis, ke temas pri sole formala transpreno de funkcio sen iu ajn persona respondeco. Mi devas ja informi vin, ke ni plurfoje eĉ staris antaŭ la baza demando kiel ekpaŝi kaj direkti nian laboron por reakiri bonan renomon de nia Asocio kaj konfidon de niaj superaj organoj, tiun konfidon, kiun kelkiuj niaj membroj sufiĉe grave diskreditigis. Nia intenco helpi al nia patrujo laŭ modifoj al ni donitaj, estas sincera kaj sendiskute celvola, kaj tiurilate ni agos ankaŭ estontece laŭ niaj plej bonaj eblecoj. Mi ne misinformos vin dirante, ke estis bezone konvinkadi membrojn kaj plurfoje eĉ funkciojn de niaj bazaj organizoj, ke sola vojo, kiu gvidas al evoluo de nia Asocio estas plena enmuntiĝo de nia membraro en ĉiutagajn devojn, taskojn kaj bezonojn de nia socio kaj kontraŭe la izoligo en propraj interesoj, en la kluba vivo sen plua kunvivo kun socia ĉirkaŭaĵo tutcerte signifos forŝiron de nia organizo, de nia tuta homa socio, per tio ankaŭ perdon de intereso de tiu socio pri niaj ideoj kaj laborceloj kaj en pli posta etapo vegetadon en la vivoperiferio kaj finan pereon.

La asocia prezidantaro dum siaj nombraj traktadoj analizis entutan situacion kaj skizis taktike bezonajn paŝojn kiel elimini similan situacion. Eblas miaflanke aserti, ke gravgranda parto de nia membraro tre frue enkapigis tiujn ĉi bazajn intencojn kaj subtenis ilin. Sed mi devas ankaŭ rememorigi vin, ke tiusence ekestis pluraj problemoj, malfacilaĵoj, jes eĉ atakoj kontraŭ la asocia gvidado kaj ne mankis ankaŭ trapensitaj planitaj kampanjoj kun celoj diskreditigi la gvidadon ne sole antaŭ la membraro mem, sed eĉ antaŭ la ŝtataj aŭtoritatoj – ankaŭ en eksterlando. Kompreneble tion ni ne povis senatente preterlasi kaj estis bezone akcepti ankaŭ kelkajn nepopularajn aranĝojn, kiuj finis per administra interveno, kiam helpis nenia konvinkado.

Estimataj gekamaradoj, en tiaj kondiĉoj laboris nia Centra komitato kaj ĝia prezidantaro kaj se ni estas nun pozicie multe pli firmaj ol antaŭ la lastaj tri jaroj, tiam permesu al mi esprimi mian sinceran dankon al tuta vico de miaj kunlaborantoj ne nur al tiuj de centra gvidado, sed ankaŭ al tiuj en tereno, kiuj sendiskute subtenis la gvidadon de nia organizo, plenumadis bezonajn taskojn kaj gvidis bazajn tavolojn. Ni estu dankemaj ankaŭ al organoj kaj organizoj kun kiuj nia Asocio plimalpli larĝe kunlaboras. Sen tiu ĉi helpo ni neniam kapablus atingi ĉe nia movado tiun nivelon, kiun ni nun havas.

Ĉeĥa Esperanto-Asocio agorde kun akceptitaj principoj de nia II-a kongreso ellaborigis ankaŭ akceptitajn principojn de la XIV-a kongreso de Komunista partio de Ĉeĥoslovakio en kultura sfero kaj preparis bazon por pluraj kontraktoj kun organizaĵoj en nia ŝtato kaj ankaŭ ekster ĝi. Temis speciale pri Interkonsento pri la kunlaboro inter la Asocio de ĉeĥaj filatelitoj kaj nia Asocio. Sekve de ĝi naskiĝis Esperanto-sekcio ĉe komisiono de tema filatelio, kies membroj tre gravsignife partoprenas diversajn ekspoziciojn kaj meritite akiras altajn aprezojn propagandante kaj nian landon kaj Esperanton samtempe. Certe ne malpli signifas Interkonsento subskribita inter Federacia Packomitato kaj la Kunordiga komitato de niaj du respektivaj landaj Asocioj en la kadro de porpaca kunlaboro. Kiel unua Interkonsento kun eksterlando estis subskribita tiu de kunlaboro inter la organizo de esperantistoj en Germana Demokratia respubliko kaj nia Kunordiga komitato -

pasintomere en Varno. Kaj simile ni celas pliprofundigi nian entutan kunlaboron kun lokaj, distriktaj aŭ pli altaj instancoj de Svazarm, Packonsilantaroj, unuopaj fakoj de Naciaj komitatoj.

Internacie nia Asocio plenumas laŭeble ĉiujn taskojn, kiuj dum ĉiujaraj konsultaj kunsidoj de reprezentantoj de socialismaj landaj asocioj elfontas. Mi ne forgesu ankaŭ tre gravan faktan - nian partoprenon en la gvidado de Mondpaca Esperanto-Movado. En Universala Esperanto-Asocio nia Kunordiga komitato havas siajn tri reprezentantojn, komitatanoj de kategorio A. Kaj mi ĝoje konstata, ke niaj bazaj organizoj, en siaj jarplanoj ofte havas tiajn laborpunktojn, kies plenumado fierigas nin, kvankam estas ankaŭ tiaj, kiuj ankoraŭ ne plene kontentigas niajn dezirojn. Simile estas ĉe niaj sekcioj kaj komisionoj, sed tiu ĉi sfero estos tuŝita aliloke. Ni notu la komencitan kunlaboron kun TEJO, bonan kaj vere fruktodonan kunlaboron kun Asocio de Esperantistoj en Slovaka socialisma respubliko, en kreskanta kultura kaj turisma kunlaboro kun najbaraj asocioj. Kaj se ni sukcesos aranĝi en proksima estonteco Universalan kongreson en nia lando, tiam ni atingos kulminon de nia laboro kaj devos fari ĉion por sukcese superregi ĉiujn obstaklojn, kiujn simila mondskala aranĝo alportas. Mi certas, ke en nia ŝtato estas ĉiuj kondiĉoj por aranĝi tiaskalan kongreson, kiun la partoprenanto ne forgesos. - Finfine mi ne forresu diversajn kulturajn kaj turismajn aranĝojn, kiuj de jaro al jaro atingas pli vastan popularecon kaj publikecon. Cetere nia presorgano STARTO pri tio ofte vaste informas. Kaj se ni ricevadas aprobajn skribojn pri STARTO mem, tiam ĉiuj ĝoju komune, ĉar la fakto estas unu el dokumentoj de nia kresko. Preskaŭ elĉerpitaj ĉiuj numeroj de Panoramo ankaŭ samkiel la entuta komerca agado de la sekretariejo atestas nian malstagnon. Tiusence ni planas pliriĉigi nian vendostokon, sed pri tio raportos la sekretario.

Permesu al mi ankaŭ diri nur kelkajn frazojn pri Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, kiu ĉiujare atingas pli altan nivelon. Certe ni sincere ĝojas pro tio. Kaj se multiĝas la internacia partopreno, tio nur substrekas la entutan signifon de tiu ĉi somera lernejo kaj ripozejo samtempe. Persone mi ripetas mian malnovan peton pri pli vasta kunlaboro de ne nur ĉeĥa kaj slovakaj tendaroj, sed ankaŭ kun tiuj el eksterlando.

Certe mi povus daŭrigi en pozitiva kaj bedaŭrinde ankaŭ negativa senco. Tamen mi konstata, ke tiuj negativaj trajtoj en nia movado iom post iom estiĝas raraj kaj se ni ĉiuj kunagos agorde laŭ la intencoj, kiuj gvidis al la fondo de la Asocio, tio estas se ni daŭrigos serioze solvodon de lingvaj problemoj, kunlaboron en la lukto por paca kunlaboro de popoloj, se ni ĉiuj celos pliprofundigi konojn kaj sciojn de eksterlandaj esperantistoj pri nia lando, tiam sub la tegmento de nia Asocio ne estos loko por atakado de niaj funkciuloj, de bona nomo de la Asocio.

Niaj planoj por la proksima estonteco estas klaraj kaj sugestaj. Vi baldaŭ aŭdos pri ili kaj povos pri ankaŭ diskuti kaj pensi. Plenrespondece mi do substreku la konstaton, ke entute la pasinta trijara periodo de nia dua kongreso ĝis hodiaŭ estas pozitiva. La firmigo de demokratia centralismo en la asocia gvidado estis atingita, en la funkciojn por la proksimiĝanta periodo estas instruitaj funkciuloj entuziasmaj kaj bone sciantaj pri siaj devoj kaj taskoj. Kaj se ni alkalkulas la mondan ŝanĝon en la pliaktivigo de bezono de la interkompreniĝo pere de Esperanto surbaze de UNESCO kaj aliaj mondaj organizaĵoj, tiam ni kun optimismo rigardu en la estontecon, ĉar nia ĝisnuna penado kaj laborstreĉado ofte je kosto de niaj familioj aŭ de nia sano ne estis vana kaj sencela. Por la homaro ni ja celas tion plej noblan: p a c a n i n t e r k o m p r e n i ĝ o n k a j k u n l a b o r o n.

Kaj se tiel estas, permesu al mi esprimi miajn vere sincerajn kaj profundajn dankon kaj estimon al miaj plej proksimaj kunlaborantoj, la sekretario unuavice, la asociaj oficistoj, kiuj zorgas pri glata funkciado de la bele ekipita sekretariejo, kiun multaj avide rigardas, al la funkciuloj de la prezidantaro kaj centra komitato kaj al ĉiuj, kiuj liberigas nun sian lokon al aliaj. Mi esperas, ke ni ĉiuj dediĉos niajn spertojn laŭ niaj eblecoj tie, kie montriĝos ties bezono.

Koran dankon pro via atentemo!

Josef Vitek

# LA ORGANIZA STRUKTURO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

ĈeĤa Esperanto-Asocio (ĈEA) estas la sola organizaĵo, rekonata de la ŝtato, kiu havas la rajton reprezenti la esperantistan movadon en ĈeĤa Socialisma Respubliko. Ĝi estas la subjekto de rajtoj kaj devoj, respondecas pri la evoluo de la enlanda esperantista movado kaj pri la oficialaj kontaktoj kun eksterlando.

La organiza strukturo de la Asocio estas konstruata laŭ la principo de strikta demokratia centrismo. La asocia agado efektiviĝas parte pere de komisionoj kaj sekcioj, parte rekte pere de la sekretario de la Asocio.

ĈEA prilaboras perspektivajn planojn de sia agado (nuntempe por la periodo 1976 ĝis 1980) kaj laŭ ili precizigas partajn planojn. Tiujn ĉi bazajn direktivojn kontinuigas planoj de unuopaj komisionoj kaj sekcioj, tiel, ke estu plenumita la intenco de la Asocio, fiksita por unuopaj periodoj.

La komisionoj kaj sekcioj prezentas siajn planojn per aprobo al la asocia estraro. Sian agadon ili disvolvas pli malpli memstare. Sole principaj decidoj influantaj la politikan, ekonomian flankon de la agado de l'Asocio, eventuale kontraktoj aŭ devontigoj rilate al eksterlando, estas konsultataj kun la estraro kaj post ties aprobo realigataj. La sekcioj aŭ komisionoj ofte komune partoprenas en realigo de iuj planoj, eventuale prezentas proponojn por komunaj eldonoj, renkontiĝoj aŭ aliaj agadoj de la Asocio.

La laboro en la komisionoj aŭ sekcioj estas principe libervola. La Asocio financas nur la plej urĝajn pagojn, konekse kun poŝtelspezoj, vojaĝoj kaj administrataj havaĵoj.

La gvidantojn de la komisionoj kaj sekcioj nomas Centra Komitato de la Asocio, al kiu ili respondecas pri la agado. Ili rajtas elekti membrojn de la komisionoj aŭ la sekciaj estraroj kaj rekomendi ilin al la asocia estraro.

La propra organiza skemo (vidu malsupre), montras la dependecon kaj respondecon de la centraj organoj de la Asocio. ĈEA nuntempe havas 2 400 anojn, plejparte aliĝintajn al 70 lokaj grupoj. En lokoj, kie ne troviĝas bazaj organizaĵoj, oni povas akcepti unuopulojn kiel senperajn membrojn.

Nuntempaj sekcioj kaj komisionoj de la asocio:

1) Komisionoj:


Ideologia, Centra kontrola kaj revizia, Propaganda, Lingva, Ekzamena, Turista kaj Junulara;

2) Sekcioj:

Porpaca, Pedagogia, Sciencoteknika, Fervojista, Medicinista, Blindula.

Ĉiuj komisionoj kaj sekcioj respondecas al la estraro de la asocio. Centra kontrola komisiono respondecas al Centra komitato de la asocio kaj informas pri ĉiuj kontroloj la asocian estraron. Tiu ĉi komisiono rajtas kontroli ne nur ekonomiajn aferojn de la asocio kaj de ĉiu loka grupo, sed ankaŭ plenumadon de akceptitaj decidoj, proponoj kaj planoj.

Organiza skemo de asocio:



Estrojn de komisionoj nomas Centra komitato de la asocio. Gvidantoj de la sekcioj estas elektataj de la konferencoj de tiuj ĉi sekcioj.

Kelke da dokumentoj kiuj rajtigas ekzistadon de la asocio kaj permesas al ĝi agi en diversaj sferoj:

- 1) Statuto de ĈEA akceptita de la Ministerio de Internaj Aferoj de Ĉeĥa socialisma respubliko, n-ro NV-III/3 - 153/69, la 24-an de februaro 1969;
- 2) Renovigita statuto, akceptita de la sama ministerio sub la n-ro VS/1 - 2553/76, la 16-an de marto 1976;
- 3) Komerca aktiveco estis aprobita per la Decido de Nacia komitato de Praha 1 sub la n-ro Obch/1164/76, la 15-an de julio 1976;
- 4) Kolekti kaj publikigi reklamojn en STARTO estas permesita per Dekreto de la Sekcio por planado de Nacia Komitato de la ĉefurbo Prago n-ro K/la/214 de la 24-a de julio 1975;
- 5) STARTO estas signita en la katalogo sub la numero 735 142 1025 81;
- 6) Eksporti kaj importi la librojn, gramofondiskojn kaj aliajn kulturajn valoraĵojn rajtas la asocio laŭ la permeso de Centra doganoficejo, n-ro 739/77-I/h1, de 28-a de februaro 1977;
- 7) Asocio estas kolektiva membro de UEA laŭ la permeso de la Ministerio de Kulturo de Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko, n-ro 7191/70-IV/1 el la 28-a de aprilo 1970;
- 8) Kunlaboro kun Centra Laborrondo de Esperanto en Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko okazas laŭ la Interkonsento subskribita ambaŭflanke la 3-an de aŭgusto 1978.

La asocio ĝis nun eldonas regule jenajn presaĵojn:

- "Informilo" por funkciuloj de la sekcioj, komisionoj kaj lokaj grupoj, stencilita, formato A4, 8 - 12 foje jare;
- "STARTO", asocia ofsetpresita dukolora gazetinformilo, formato A5, min. 24 paĝoj, 6-foje jare
- "SANO" (antaŭe: "MEDICINISTAJ INFORMOJ"), ofsetpresita unukolora informilo de Medicinista sekcio, 16 paĝoj, 4-foje jare;
- "PANORAMO", kultura almanako, ofsetpresita dukolora kajero (min. 80 paĝoj), 1-foje jare;
- "PACO", ĉeĥoslovaka numero, formato A4, 16-24 paĝoj, min. 1-foje jare.

Zdenko Křimský